

SUDFRANCIA STELO

N° 197 - 2a kvaronjaro 2011 - 2^{er} trimestre 2011



**Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono**



Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE
15, rue du Verdier 34120 TOURBES xianmoure@orange.fr

Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arnaud LAGRANGE



POST IREM

En tiu bulteno, ni raportas pri IREM 2011 (Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo 2011) kiun ni travivis. Preskaŭ 400 personoj partoprenis al plena programo - tro plena laŭ kelkaj plendoj ! Sed neniu plendis pri enuo..... Je nomo de la LOKO (Loka Organiza Komitato) do nome de Esperanto-France, SAT-Amikaro, de la Fervojistoj kaj de nia federacio, mi volas danki la federacianojn kaj ne-federacianojn kiuj helpis al la organizo de la renkontiĝo – ilia aktiva partopreno ebligis la sukcesan realigon. Kiel en 1998 en Montpellier, ne bezonas esti multaj dekoj por sukcesi, sed sufiĉas forte deziri kunlabori en bona etoso! Ni antaŭvidis finanĉan deficiton pro tre alloga kaj kosta programo sed finfine la bilanco estas pozitiva pli ol 2600€!

De multaj jaroj, la franca esperantistaro deziras interasocian laboron de niaj asocioj tra renkontiĝoj. Signifa estas la komuna projekto Eo-France kaj SAT-Amikaro pri "Esperanto au Bac" kies lanĉado okazis dum IREM, ni esperas ke ĝi estas la komenco de daŭra kunlaboro.



Alia aspekto de la esperantista laboro, temas pri ekzamenoj. De multaj jaroj ekzistas francaj ekzamenoj organizitaj de FEI (Franca Esperanto Instituto) kiuj favore kuraĝigis la lernantojn - ankaŭ la internaciaj ekzamenoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). Esperantistoj jam de longe scias ke ni vivas en internacia etoso- por ni pli videbla estas Eŭropo. Gravas do trapasi la KER (Komuna Eŭropa Referenco) ekzamenojn kiuj havas oficialan rekonon. Sed tiuj ekzamenoj estas provizore proponitaj – ju pli estas da ekzaminintoj, despli ni kontribuas al definitiva rekono de nia lingvo. En 2011, okazis sesioj en Sète kaj tuj poste en Gresillon, ĉiufoje estis cirkaŭ 30 partoprenantoj. Ne aperis ĝis nun datoj de sesioj en Francio en 2012 – pripensu kaj ekzameniĝu!

JF. PASSARELLA

AKCEPTEJO



Vendredi soir, c'est l'ouverture ... pour les espérantistes. La soirée officielle, c'est demain. FaMo anime la soirée, présente les artistes de divers groupes ... que de talents cachés dans le monde de l'espéranto.

"Saluton, kiel vi fartas?" (bonjour, comment allez-vous ?). Dans le jardin du Lazaret, on bavarde, on s'enquiert des absents, on choisit les activités, les conférences, les visites touristiques. On consulte le "Livret du congressiste" dans lequel est présenté un programme riche et détaillé pour les 5 jours à venir. Qu'il est difficile de faire son choix, on voudrait tout écouter, tout voir. Pointons notre sélection.

Madame Sampei Keiko, espérantiste japonaise, une des rescapées de Sendai-Si, évoque émue, le terrible tremblement de terre qu'elle a vécu personnellement, ce que vivent ses compatriotes et son pays. Mme Keiko a enchaîné en présentant la très ancienne technique du théâtre d'images pour raconter 2 jolies légendes.

Intervention de la japonaise, Mme Sampei Keiko -d'abord à l'aide de coupures de journaux japonais nous avons revécu avec elle le grand séisme et le tsunami qui a suivi puisqu'elle habite sur les hauteurs de Sendai. Ensuite elle nous a raconté avec l'aide d'images portatives deux contes pour enfants. Le système est simple: les images sont encadrées dans un montant en bois. Elle raconte la première image puis elle glisse celle-ci derrière et ainsi de suite jusqu'à la fin. Cela se faisait autrefois dans les jardins publics ou dans les lieux utilisés par les enfants. Il existe aussi des histoires pour



adultes. Vendredi soir, déplacement en bus vers le centre ville. Au cinéma Comoedia, Dominique Gautier présente son film documentaire sur l'espéranto. Plus tard, à la salle G. Brassens débute le concert de J.Yvart accompagné de FaMo. Ils interprètent Brassens en espéranto. "Bravo, encore bravo...."



Retour aux propos sérieux. Avec le conférencier, Pierre Bouvier, nous tentons de trouver la réponse à : l'espéranto, langue facile ou non ? Discussion passionnée mais les avis sont partagés. A la prochaine rencontre, en 2012 ?, peut-être que, enfin, on ne confondra plus DRINKI et TRINKI.

Avec l'espéranto, on voyage... Mr Narendra Raj, espérantiste népalais raconte son pays. La plus grande surprise est d'apprendre que ce petit pays compte 1000 espérantistes.



D'autres thèmes m'attirent : Cuba, la vie à Sète, l'occitan, sa culture, sa langue, Wikipédia et l'espéranto... Pendant que je m'instruis et me distrais, certains passent des examens d'espéranto.

Tout s'achève, même les rencontres. La troupe théâtrale de Toulouse, Patric, le chanteur occitan et Jomo et Solniska effacent quelque peu la tristesse au moment des adieux. Chance pour nous espérantistes, le soleil a brillé ... quand il n'a pas plu (iomete, iomete). Nous avons partagé "notre Espéranto" dans un lieu très agréable, arboré, fleuri et les goélands curieux s'approchaient de nous pour écouter ... ou picorer des miettes.

Merci aux responsables du centre, au personnel particulièrement à ceux qui s'occupaient de nous à table, si patients, si souriants.

Le centre familial de vacances le Lazaret, on y est bien, on s'en souvient, on y revient

Geneviève et Line (CBE)

EXPOSITION "ESPERANTO.... AU BOUT DE LA LANGUE" à la Médiathèque F. Mitterrand de Sète et ATELIER DECOUVERTE de l'ESPERANTO

Le Cercle Biterrois de l'espéranto a installé une exposition dans la médiathèque F. Mitterrand et convenu d'une animation dans les deux médiathèques de Sète. Dans l'après-midi du 20 avril, à la médiathèque A. Malraux, 8 enfants de 7 à 12 ans ont découvert l'espéranto à travers des jeux de pliage expliqués et

commentés dans cette langue. Intéressés et amusés ils étaient prêts à poursuivre l'initiation.

L'accueil chaleureux des responsables et animateurs en plus de la réaction des enfants est un encouragement à poursuivre ce genre de démarche pour faire découvrir l'espéranto. *Jacqueline Maurel, Béziers*

RASSEMBLEMENT inter associatif à Sète à Pâques 2011.

Ce rassemblement a eu lieu au Lazaret, important centre de vacances, face à la Méditerranée dont le personnel a été très coopératif. Nous les remercions particulièrement.

Différents intervenants ont fait des conférences pendant que des militants ont participé à de longues discussions sur leurs associations. Et parallèlement, certains participants ont visité la région. Pendant ce temps, de nombreux groupes se formaient en amicales retrouvailles entre ceux qui s'étaient connus au Népal, en Allemagne, à Cuba, dans un congrès mondial... au milieu de ce grand parc du Lazaret ou devant le bar. Les soirées se sont déroulées dans une



ambiance
chaleureuse grâce à
des spectacles de
très grande qualité :
vendredi 22 FAMO,
chanteur et
accordéoniste ;
samedi 23, Jacques
YVART a chanté
BRASSENS avec
FAMO

l'accompagnant à l'accordéon ; dimanche 24, la Compagnie KAJ TIEL PLU nous a charmés avec chants et musique catalans ; KAPRIOL' a fait danser au



moins la moitié des
spectateurs et le 25,
nous avons eu la
troupe théâtrale de
Toulouse puis Patric,
chanteur en occitan
et le bouquet avec
JoMo et le groupe
Solniska.

*Francis et Monique,
Lozère*

L'espéranto au service des immigrés en présence de 170 participants.

Samedi 23 avril 2011, les rencontres inter-associatives d'espéranto de Sète ont commencé par un débat sur l'utilisation de l'espéranto par les immigrés en France. Une petite histoire des migrations dans le temps et dans le monde a permis de mettre en évidence quelques contre-vérités :

Les personnes qui émigrent ne sont pas les plus pauvres, qui n'ont pas les moyens de payer le voyage. Elles déménagent rarement pour le plaisir, mais pour des raisons économiques, culturelles, climatiques, politiques ou pour fuir des zones de conflits ou de guerre. En très grande majorité (plus de 80%), elles rejoignent les pays les plus voisins.

Seuls 1/3 d'entre elles émigrent de pays du sud vers le nord ; un autre 1/3 émigre du sud vers le sud ; 1/4 du nord vers le nord et enfin 8% du nord vers le sud.

Un espérantiste de la république démocratique du Congo nous a fait part de son témoignage poignant. Il a détaillé son parcours depuis 2009 de sa région natale proche du Ruanda, qu'il a dû fuir pour échapper aux risques mortels encourus par sa famille. Après une année de démarches et de vie "sans papiers", il a réussi à obtenir le droit d'asile en France et un titre de séjour avec l'appui qu'il a reçu d'espérantistes qui parlaient la même langue universelle que lui.

Dans le débat court mais dense qui a suivi, plusieurs espérantistes ont fait part de leurs actions locales en France et en Belgique auprès des immigrés et des associations qui les soutiennent.

Guy Martin de St Brieuc

La visite du Canal du Midi (Béziers à Colombiers)

Après trois jours intensifs entre réunions, conférences, visites et soirées toutes formidables, l'excursion sur le Canal du Midi a été un moment tout à nous, pour nous mettre au vert de l'espéranto. Ce circuit touristique proposé a été bien programmé et même le soleil fut de la partie pour nous faire découvrir l'ex-pays Cathare. Cette excursion a



été non seulement enrichissante sur le plan culturel mais aussi récréative. La très belle balade sur le canal du midi avec ses écluses très particulières, ses voûtes ombragées et son tunnel embelli par l'érosion a été un véritable moment de détente. Le repas pris dans la péniche fut un régal avec des spécialités régionales. Nous avons admiré le magnifique et surprenant point de vue de Montady, qu'il ne fallait pas rater ainsi que la visite du site des fouilles

d'Ensérune. Sur ce belvédère qui plonge notre regard sur l'immense réalisation de cultures céréalières à la forme d'une roue de vélo géante aux multiples rayons - (figures géométriques parfaites) - Tout autour s'étendent à perte de vue des terrains viticoles. Nous avons ressenti beaucoup d'émotion devant ce mélange subtil de beautés naturelles et celles laissées par les griffes de l'homme au cours des siècles - Ici l'homme a su maîtriser la nature en joignant l'utile à l'agréable -



Tous ravis par cette belle excursion loin des bruits de la ville, nous nous sommes promis d'y revenir très vite.

Gérard de Montbeton

ESPERANTO-FRANCE

Karaj amikoj,

Dum tiuj lastaj jaroj, vi kunsidis, debatis, protokolis, organizis surloke kaj interrete la preparojn de tiu renkontiĝo kies nomo estas IREM. Dum tiuj tagoj, vi plu laboregis, apenaŭ dormis, perfekte gvidis la kongresanojn, tradukis, helpis kaj ĉiam jese respondis. Dum tiuj samaj tagoj, ni amuziĝis, bone manĝis, ĝojegis tiun bonegan etoson, iomete labore kunvenis kaj sekvis interesajn prelegojn.

Ĉion kion ni plezure faris, ne eblus sen viaj klopodoj kaj nome de Esperanto-France, mi plej elkore dankas vin pro tio. Mi unue deziras danki Jean-François Passarella pro lia pacienco kaj helpemo, mi deziras danki Arno Lagrange kaj Flo Martorell pro ĉiuj teknikaj solvoj kaj pro la riĉeco de la vespera programo.

Mi deziras gratuli Serge kaj Monique Eysseric kaj Frédéric Bourquin pro la diverseco de la ekskursoj. Mi deziras danki Véronique Bichon pro la mastrumado de la aliĝiloj kaj ŝia respondemo al niaj multnombraj demandoj. Louis Ensuque kaj Jeannine Bony por la ordigo de la programo, Maria Perez y Sanz pro ĉiuj financaj aferoj. Varmajn dankojn mi sendas al Henryka Olek pro la rilatoj kun la lokaj gazetoj kaj urbaj respondeculoj.

Mi deziras danki ĉiujn, kiuj partoprenis al la akceptejo kaj la trinkejo.

Kaj mi finfine deziras varme danki kaj gratuli ĉiujn respondeculojn de la diversaj asocioj, kiuj partoprenis al la preparado de tiu kongreso : Claude Nourmont por Esperanto-France, Sylviane Lafargue por la fervojistoj, Vito Markov por SAT-amikaro, Monique Arnaud por GEE kaj Frédéric Scibor por FET. Tiu interasocia kongreso estas grava paŝo por niaj asocioj kaj por la tuta esperanta movado. Vi ŝparis nek vian tempon nek vian energion por sukcesigi la tuton...

Axel Rousseau prezidanto de Esperanto-France

SAT-AMIKARO

Karaj,

Mi profitas la mesaĝon por varme ĉiujn danki kaj gratuli pro laŭ mi (kaj multaj aliaj, laŭ eĥoj kiujn mi ĝis nun havis) tre sukcese organizita renkontiĝo.

Refoje mi mencias, ke mi plezure kunlaboris en la skipo, kaj tre kontentas pri la fina rezulto. Ankaŭ nome de SAT-Amikaro mi evidente dankas kaj gratulas.

Bonan ripozon al vi ĉiuj, kiuj ĝin meritas kaj verŝajne bezonegas!

Plej amike, *Vito*

FERVOJISTOJ

Karaj geamikoj, je la nomo de nia prezidanto Sylviane Lafargue, mi deziras gratuli la tutan teamon, kiu permesis al ni trapasi agrablajn tagojn en bonega etoso. La evento laŭdire plaĉis al ĉiuj partoprenantoj. Dum la tuta periodo ni ĝuis interesajn prelegojn, agrablajn distrajn vesperojn, varman akcepton en iu loko ŝajne feria. Vizitoj permesis al ni malkovri la regionon. Ĉio iris glate. Nur unu bedaŭro : la fervojistoj parte neglektis tiun aranĝon. Pro ilia defendo mi povas diri ke ili ne kutimas frekventi esperantajn aranĝojn dum Pasko. Alia fakto estas ke, post unu semajno, ni denove foriros al Liberec en Ĉeĥa Respubliko por partopreni nian internacian kongreson. Ankoraŭ dankon al ĉiuj kiujn mi ne deziras nomi pro timo de forgeso de iu nomo. Tamen apartan dankon al Jean-François pro lia konstanta sindediĉo al Esperanto. Amike al ĉiuj *Jean Ripoché*

HAGAR DUNOR le Viking

27 MAI 2011 Le Républicain Lorrain



L'HERAULT du JOUR

21 AVRIL 2011

Ac

Idiome. Jacques Yvart se produit en concert samedi à 22h. Il chantera le répertoire de Georges Brassens en Espéranto.

L'Espéranto, une langue vivante à la portée de tous

■ Bonan tagon, Kiel vi fartas ?, Dankon* ... Ce n'est pas du quechua ou autres dialectes indiens, mais bien de l'Espéranto.

Du 22 au 26 avril se déroulera à Sète, au Village-Vacances Le Lazaret, la rencontre inter-associative sur la Méditerranée (IREM2011). La fédération Espéranto du Languedoc-Roussillon est à l'initiative de cet événement, co-organisé avec d'autres associations espérantistes. A ce jour, plus de 350 participants sont annoncés, venant de toute la France, d'Europe (Belgique, Bosnie, Espagne, Hongrie, Italie, Luxembourg, Pays-Bas, Russie, Suisse et Tchéquie) et même d'autres continents (Cuba, Japon et Népal). Mais ce ne sera pas une tour de Babel puisque tous communiqueront en espéranto, leur langue commune.

Un programme riche et varié va égrener ces journées : séances de travail, une vingtaine de conférences, tables rondes et ateliers, sessions d'examen d'espéranto, concerts et théâtre ainsi que plusieurs excursions à Sète et dans la région...

« C'est Louis-Lazare Zamenhof, un médecin polonais qui a créé cette langue universelle inspirée des langues indo-européennes à la fin du 19ème siècle, explique une espérantiste sétoise. L'Espéranto est très logique et s'apprend très facilement ». L'orthographe est simplifiée par sa nature phonémique : tous les mots s'écrivent comme ils se prononcent. La grammaire de l'Espéranto est élémentaire : seulement 16 règles en tout. L'ordre des mots étant libre, la langue peut s'adapter à toutes les cultures, à toutes les habitudes linguistiques. « Je l'ai apprise très vite avec un livre en 11 leçons, confidentelle. Au bout de quatre semaines, j'étais capable d'écrire une carte postale. Quand j'ai rencontré des espérantistes en Russie, je pouvais prendre part à une discussion et



Des congrès universels ont lieu dans différents pays chaque année. Ici, à Séoul.

émettre des opinions. Ce n'est pas l'anglais qui m'aurait servi à communiquer ». Il suffit d'apprendre un très petit nombre de racines pour pouvoir s'exprimer. Ces dernières proviennent de racines latines, germaniques et slaves. Un jeu de préfixes et suffixes permet de créer des dizaines de mots.

Faire découvrir la langue par le biais de la culture

Des millions de personnes parlent cette langue vivante dans le monde entier et son évolution est prise très au sérieux. « L'Académie de l'Espéranto veille à sa qualité. Elle est donc contrôlée par les membres. Ils valident ou pas les nouvelles terminologies par

exemple ». Et de poursuivre : « Nous souhaitons faire découvrir l'Espéranto par le biais de la culture ».

Pour cela, un concert de Jacques Yvart est organisé samedi à 22h à la salle Georges Brassens. L'artiste chantera le répertoire du chanteur éponyme en espéranto. C'est aussi la sortie officielle de « Brassens Plu » son 29ème album. Un documentaire de D. Gautier, intitulé « Espéranto » sera présenté samedi à 20h30 au Comoedia. Au programme également le 24 avril à 21h à la salle G. Brassens, un bal folk avec la participation du groupe catalan « Kaj Tiel Plu » et de « Kapriol' », groupe folk des Pays-Bas. Au menu également le 25

avril à 22h au Lazaret, « JoMo et Solnicka », spectacle d'ambiance slave. A noter que JoMo est dans le livre Guinness des Records pour avoir chanté en 22 langues différentes. A vos dictionnaires ...

LAURENCE LADEN-SALUSTE

y * Bonjour, comment ça va ? merci.

** L'ouverture officielle de l'IREM 2011 est prévue le 23 avril, à 17h30 au centre vacances Le Lazaret suivi d'un vin d'honneur.

*** Les invitations pour les concerts du 23 et 24 avril sont à retirer à l'Office de tourisme à Sète, 60 Grand-rue Mario-Roustan. Tél. 04 99 04 71 71.

INTERASOCIA RENKONTIĜO DE ESPERANTO ĈE MEDITERANEO **22a-26a de aprilo 2011**

Ĝi okazis ĉe la Mediteranea maro en la urbo Seto (Sète). Ĝi estis bone organizita. La aranĝon partoprenis ĉirkaŭ kvar cent esperantistoj ne nur el Francio, sed ankaŭ el foraj landoj. Venis gastoj el Japanio, Kubo, Nepalo, Rusio kaj el pluraj eŭropaj landoj.

La inaŭguron ĉeestis la urbestro kaj la vicurbestro de la urbo Seto. La urbestro s-ro François Commines bonvenigis nin kaj deziris al ĉiuj agrablan restadon. Poste sinsekve salutis la publikon reprezentantoj de diversaj organizaĵoj kaj esperantistoj el ĉeestantaj landoj. Sekvis invito al honorvino. Ĉe la strando ni komune fotiĝis.

La aranĝo okazis ne tro malproksime de la urbocentro en la familia feriejo “Le Lazaret”. Tie estis ĉio necesa por akcepti la partoprenantojn. Riĉa taga, vespera kaj ekskursiva programo kontribuis al bona etoso dum kvin tagoj plenumante dezirojn de ĉiuj ĉeestantoj. La oferto de prelegoj estis abunda. Kompreneble (kiel ofte okazas en ĉiuj E-aranĝoj) ne eblis ĉeesti ĉiujn proponitajn programerojn ĉar pluraj okazis samtempe.

Kunvenis kaj kunsidis Espéranto-France, Sat-Amikaro, Fervojistoj, FET, EDE kaj aliaj. Ĉiuj asocioj kaj laborgrupoj havis eblecon labori kaj diskuti pri siaj agadoj kaj organizaj aferoj. Okazis KER-ekzamenoj. Ni spektis premieron de interesa dokumenta filmo pri Esperanto. Plue ni eksciis kiel Esperanto helpis al migranto el Kongo al Francio por ricevi politikan azilon. Sekvis diskuto pri helpo al rifuĝintoj en tiu-ĉi ne facila situacio. La japanino Sanpei Keiko parolis pri la antaŭ nelonge okazinta tertremo kaj cunamo en Sendai. S-ro Narendra Raj Bhattarai el Nepalo rakontis pri sia lando, respondis al multaj demandoj kaj invitis al la Internaciaj Himalajaj Renkontiĝoj, kiuj okazas ĉiun duan jaron. Pri la E-edukado ĉe Interreto parolis kaj la atelieron pri Vikipedio gvidis Marek Blahuš el Ĉeĥio. Fervojistoj parolis pri vagonara signalado kaj André Mirc prezentis mallongan dokumenton pri la rapideco de trajnoj. La humuron en verkoj de Lorjak kaj Beaucaire prezentis Ĵak le Puil, pri Ker-ekzamenoj informis Katalin Kováts, pri Majaaj kulturo kaj kalendaro Philippe Chavignon, pri Kubo Maritza Gutierrez González, pri la lasta verko de Jules Verne Abel Montagut, pri peresperanta solidareco en Bosnio parolis Senad Čolić. Pri langvedoka historio informis kaj bildojn prezentis Arno Lagrange. Okazis forumo pri la okcitana lingvo kaj aliaj interesaj programeroj.

Dum la interkona vespero akordionludis Famo. Li ankaŭ akompanis koncerton de Jacques Yvart. En la urba salono “Brassens” la fama kataluna ensemblo Kaj Tiel Plu kaj la frisa ensemblo Kapriol’ kantis kaj vigle dancigis la ĉeestantojn. La etoso estiĝis plaĉa kaj gaja.

La lastan adiaŭan vesperon ni spektis tri programerojn: La Teatra Trupo de

Tuluzo prezentis “Grandioza Kongreso” verkita de Rikardo Cash. Patric ofertis al ni serion da okcitanaj kantoj. JoMo prezentiĝis unuafoje kun la muzikistoj kaj dancensemblo Solniŝka. Ĝi estis admirinda kaj neforgesebla slavecstila spektaklo kaj cigana etoso per kiuj finiĝis la lasta vespero.

Okazis pluraj duontagaj ekskursoj. Eblis promeni sur la monteto “Saint-Clair” kaj ĝui belan panoramon de la urbo aŭ ŝippromeni en la haveno de Seto kaj spekti fiŝaŭkcion laŭ nuna moderna elektronika maniero. En Cap d’Agde ni vizitis lokan muzeon pri kolekto de trovitaĵoj en akvo kaj poste la nigran strandon el bazalteroj.

Dum la lunda tuttaga ekskurso ni malkovris la Sudan Kanalon, navigis sur ĝi per ŝipo trapasante plurajn kluzojn kaj admiris ĉirkaŭan pejzaĝon dum bongusta tagmanĝo. Poste ni aŭskultis historion de vinberkultivisto kaj gustumis plurajn speciojn da lokaj vinoj. Ĉe la fino de la ekskurso ni promenis en restaĵoj de opidumo (antikva loko fortigita per remparo kaj fosaĵo) kaj trarigardis muzeon pri arkeologiaĵoj. Alia samtaga ekskurso gvidis la interesulojn al Eta Kamargo.

Dum la marda tuttaga ekskurso ni vojaĝis per vaportrajno tra la pitoreskaj cevenaj montetoj de Anduze ĝis St. Jean-du-Gard. Tie ni tagmanĝis kaŝtanajn specialaĵojn en belstila restoracio. Sekvis vizito al ekzotika bambuejo. Admirindaj estis ne nur bambuaj aleoj kaj arbaro, gigantaj sekvojoj kaj palmoj, sed ankaŭ multaj belaj floroj, kaktaj kaj bonsaĵoj en aparte bela naturo. Laste ni vizitis muzeon pri historiaj kamparanaj tradicioj, pri produktado de silko, bredado de silkraŭpoj kaj krome ni vidis aliajn interesajn aĵojn.

En la ampleksa kaj belaspekta broŝuro ni trovis, krom la programon de la renkontiĝo kaj praktikajn informojn, mapojn pri la urbo kaj loko kie ni estis, historion de la regiono Langvedoko, informojn pri la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj raportojn pri aliaj allogaĵoj de la regiono. Estis eldonitaj E-bildkartoj, poŝt- kaj glumarkoj.

Dum la libera tempo eblis rigardi kaj aĉetumi en bone provizita libroservo. Ĝin prizorgis pluraj asocioj. Oni ekspoziciis multan materialon por vendi: librojn, muzikdiskojn, bildkartojn, glumarkojn insignojn kaj aliajn kutimajn esperantaĵojn. La elekto estis abunda kaj varia.

Bona ideo efektiviĝi komunan renkontiĝon de pluraj Esperanto-asocioj plensukcesis. Ni ĉiuj ĝuis agrablan restadon eĉ se la suno ne ĉiam favoris nin.

Liba Gabalda

KER EKZAMENO APRILO 2011 dum IREM

Antaŭ ĉio mi komencos, komence :

-- Mi konatiĝis kun Katalin Kovats dum semajno en Barcelono.



Laŭ mi, Amikeco naskiĝis inter ni kaj de tiam ni rete, komunikis.

Kiam mi sciis, ke dum la IREM en Sete, ŝi prelegos pri KER ekzamenoj, mi ĉeestis sian prelegon kaj aŭskultante ŝin, mi min demandis ĉu mi ankoraŭ kapablus ekzameniĝi, ĉu memoro, sinkoncentrado permesus al mi tion fari ??

Tuj kiam ŝi finis sian prelegon mi demandis ĉu restas loko

por la C1 ekzameno :

-- Jes, ŝi respondis, 2 aŭ 3 ekzamenfolioj restas, do mi enskribiĝis.

Dimanĉon matene la 23an, je la 8a kaj duono matene, mi ne scias kiom da ekzamenontoj ĉeestis, sed sufiĉe multaj, eniris la salonon Leo Lentaigne (ĉu destina signo de Leo, kiu bonege instruis min en la komenco de mia esperanta lernado) por la skriba parto de la ekzameno.

Tuj mi elektis lokon apud la parol-aparato kaj la unua parto temis pri aŭskulto de 2 tekstoj kaj respondi poste al pluraj demandoj.

Ek de la komenco, nenio plu ekzistis ĉirkaŭ mi, krom la aparato kiu anstataŭis ekzameniston.

Mi ne klarigos pliajn partojn, nur mi diros, ke je la 12a kiam mi eliris la salonon, mi estis sufiĉe kontenta, sed... Ni vidos en junio ĉu mi ricevos aŭ ne la diplomon.

Tion, kion mi volas rakonti al vi, estas la parola parto, kiun mi trapasis lundon je la 16a.

Kiam mi eniris la salonon, Katalin kaj viro (kiun mi nur vidis en la ĉeestantaro de la Kongreso), sidis malantaŭ tablo kie mi sidiĝis.

La viro demandis al mi mian nomon, mi respondis : Josee Boccadifuoco, mi loĝas en Montpellier ... Ĉar li nenion plu diris, mi do demandis : kaj vi, kiel vi nomiĝas ? Li strabe rigardis min kaj diris

-- Ne Mi, devas respondi demandojn.

Poste, montrante sian ŝildeton, ĝis nun kaŝita sub la tablo li diris :

-- Mi estas Cyrille Hurstel !

--- Ha ! Mi konis vian nomon sed ne vian vizaĝon, dankon al vi !

Ŝajne ne tre plaĉis la demandon al li !

Poste mi parolis pri diversaj bildoj, kaj la lasta demando temis pri teksto kiun mi legis, ĝi traktis pri blindulo kaj lia hundo.

Li, en Kanado iris ĉe oficejo, peti demandon pri administra ekzameno, klarigante ke li nur akompanata de sia hundo povos ekzameniĝi.

--- Bone oni respondis al li, vi rajtas veni kun ĝi, sed nur vi parolos angle dum la ekzameno.

--- Sed mia hundo, tute ne konas la anglan, nur la francan li obeas.

--- Tio estas via afero, tamen sciu ke vi ne rajtos paroli la francan dum la tuta ekzameno.

--- Kion vi farus se vi estus en la loko de la blindulo ? Oni demandis al mi.

Do mi komencis diri, ke mi kun mia hundo, irus en la ĉefadministrejon, demandus vidi la estron. Kiam mi estus antaŭ la estro, mi donus al li la hundo-ŝnuron, dirus,

-- Jen mia hundo ! Mi vindus la okulojn al li, mi akompanus lin sur la straton kaj dirus (tie mi demandis al Katalin):

-- Ĉu mi rajtas diri malbelan vorton ?

--- Kompreneble ŝi diris, ridetante)

--- Jen, nun kun mia hundo, ‘’ elmerdiĝu ‘’ !

Mi tute ne povas klarigi al vi la mienon de Cyrille !!!

Tamen mi demandas al vi : "en la kutima vivo, ĉu oni ĉiam diras, belajn, ĝentilajn vortojn, ĉefe kiam oni tiel traktas nin, kiel sentaŭgulojn ?

Tuj mi eksciis, ke mia noto malaltiĝos pro tiu vorto.

London post la vespermanĝo, la notaroj estis afiĉitaj kaj mi rajtis 49/60.

Multaj rajtis 60/60, tamen mi estis kontenta kuraĝi diri kion mi pensis !

Nun senpacience mi atendas la rezultojn, eble en junio ? *Josée Boccadifuoco*

SUKCESA RENKONTIĜO en SETO

De la 22-a de aprilo ĝis la 27 okazis en Seto grava E-o renkontiĝo (kun preskaŭ 400 partoprenantoj), kiu kunigis plurajn asociojn de nia movado :

- Espéranto-France, SAT-Amikaro, Franca Fervoĵista Esperanto-Asocio, Franca Katolika E-o-Asocio, Fédération Espérantiste du Travail, Groupe des Enseignants Espérantophones, Eŭropo Demokratio Esperanto, Franca Esperanto-Instituto, Eurokka, Langvedoka-Rusiljona Federacio.

La rendevua loko en Seto troviĝis en la bone konata Lazaret – belega loko tuj apud la marbordo. Ĝi disponigis al siaj esperantaj klientoj sufiĉe da ĉambroj, ĉu individuaj, ĉu dultaj, ĉu pli ampleksaj. La manĝoj okazis trifoje tage en vasta manĝejo, kie renkontiĝis la plejparto de la ĉeestantoj.

Grava pluso estis la ebleco uzis plurajn diversajn salonojn interne de Lazaret. Tio ebligis la koincidon de kelkaj samtempaj prelegoj. Pluraj spektakloj okazis en la urbo mem, en kinejo kaj teatro.

Sabate posttagmeze, post komuna foto sur la apuda plaĝo, alvenis la urbestro de Seto, S-ro Fr. Commeinhes. Li bonvenigis nin kaj malfermis la renkontiĝon en

la spektakla salono de Lazaret. Posta aperitivo kunigis ĉiujn en la sama vasta salono.

La aktivaĵoj disvolviĝis laŭ kvar direktoj :

Laborsesioj

La ĉeestantaj asocioj profitis la okazon, ke multaj membroj kolektiĝis en Seton por okazigi sian jaran ĝeneralan asembleon. La liston de tiuj renkontiĝoj oni trovis sur la informa libreto, kiun ĉiu ricevis ĉe la alveno. Tiamaniere ĉiu estis informita pri la tago, la loko kaj la horo de la celita ĜA.

Ili same uzis tiun eblecon por okazigi balotadojn kaj elektojn.

Divers-temaj prelegoj

La nombro de la prelegoj estis sufiĉe granda, por ke estu malfacile elekti ! Plurfoje okazis samtempe interesaj prelegoj kaj la elekto de unu malebligis la aŭskultadon de alia, samtempa. Nu, kion fari ?

Estiel baza partoprenanto, ankaŭ mi devis elekti tion, kio plej interesis min, kaj mi informiĝis de samideanoj pri la enhavo de alia mistrafita prelego, kiun mi ŝatus aŭskulti. Jen kelkaj temoj, kiuj aparte interesis min kaj aliajn : ĉu E-o estas Fundamenta facila lingvo (de Pjer Buvje); Jules Verne kaj Esperanto, la lasta romano (de Abel Montagut); la humuro ĉe Lorjak kaj Beaucaire (de Ĵak Lepŭil); Historio de Langvedoko (de Arno Lagrange); forumo pri la okcitana lingvo : la Okcitana, ĉu prihontinda lingvo ? (de Farri); vagonara signalado (de Michel Lafosse)....

Ekzamenoj

Grava elemento de nia renkontiĝo okazis dank'al Katalin Kováts, kiu troviĝis tie kun ni por promocii kaj trapasigi ekzamenojn laŭ la nova eŭropa sistemo (KER-ekzamenoj). Multaj enskribiĝis kaj trapasis ties diversajn ŝtupojn. Ili nun atendas la rezultojn.

Distraĵoj

Multaj buntaj distraĵoj plenigis ĉiun vesperon : vendrede vespere, dum la interkona vespero, la bone konata akordionisto FaMo distris nin. La postan vesperon, okazis en la urbo du spektakloj : Dominique Gautier premiere prezentis sian filmon por promocii Esperanton. Tre multaj personoj ĉeestis. Post la eliro el la kinejo, ni direktis nin al la salono Brassens, centre de la urbo. Tie ni ĉeestis la koncerton de Jacques Yvart, kiu interpretis plurajn kanzonojn de Brassens, kun FaMo.

Dimanĉe vespere, denove du trupoj okupiĝis pri ni : unue *Kaj tiel plu*, fama kataluna ensemblo, kaj poste la nederlanda grupo *Kapriol'*! ravis nin ĝis malfrua horo.

Lunde vespere, tri grupoj atendis nin : la teatra trupo Tuluzo ludis por ni freŝe bakitan teatraĵon de Rikardo Cash. Poste, la kantisto Patric interpretis diversajn kanzonojn. Fine, JoMo kaj la trupo Solniŝka proponis al ni tutan sinsekvon da buntaj kaj energiplenaj kanzonoj.

Ekskursoj

Ankaŭ tiu rubriko estas plenplena. La programo estis tiom riĉa, ke ankaŭ tie oni devis elekti inter du aŭ tri samtempe okazantaj promenadoj.

Ĉe la alveno vendrede posttagmeze, oni kondukis la dezirantojn al la fiŝbazo, kie ni vidis kiel funkcias la sistemo de aŭkcia vendado de la ĵus kaptitaj fiŝoj – tre interesa afero. Poste okazis surŝipa vizito de la haveno de Seto, kun promenado sur la lageto Thau : vitrohava (sub la marnivelo) ŝipo ebligis vidi la mitulojn alkroĉitajn al ŝnuroj.

Aliaj klientoj vizitis la monton Sankta Klero/St. Clair, aliaj Kamargon - marde tuttage, kaj aliaj iris al Cap d'Agde. Fine la Suda Kanalo allogis multajn.

La lastan tagon, merkrede, okazis iom ekstera promenado dank'al la Cevena trajneto, kiu kondukis nin de Anduze ĝis sia fina punkto, Saint Jean du Gard. La fervojistoj aparte ĝuis tiun ekskurson, ĉar malnova vapora lokomotivo estis la centro de ĉies intereso. La fina punkto de la ekskurso estis la vizito de la bambua arbaro en Anduze.

Mi ne rajtas fini tiun raporton ne parolante pri du gravaj flankoj de nia esperanta vivo :

- la kuireja ĉefo de Lazaret meritas ĉies dankojn kaj gratulojn. Ĉiuj partoprenantoj frandis lian kuirkapablon kaj multaj akiris iom tro da pliaj kilogramoj. La ĝenerala etoso ĉiam estis tre gaja kaj agrabla.

- la libroservo. Fakte mi devus diri "la libroservoj", ĉar ambaŭ SAT kaj Espéranto-France prezentis siajn librojn. Oni dediĉis specialan konstantan salonon por tiu intelekta flanko de la Lingvo. Tiu servo funkciis dum la tuta tago tiel ke, se okazis truo en via propra programo, estis facile impeti tien. Ne nur librojn oni tie proponis sed grava loko estis rezervita al muziko kaj KD-oj (Vinilkosmo). Eĉ "Esperanto kaj insertion" de Avinjono havis tie sian tableton por prezenti sin.

